

Jack Vance

*Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas*



# Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas

*aŭtorita de*

**Jack Vance**

*tradukita de*

**Ĝan Ŭesli Starling**

**&**

**Orlando Hernández**

*ilustrita de*

**Guillaume Gévelot**

*eldonita je*

**2015-12-24**

# Antaŭparolo

**Vortaro:** Vidante vorton ‘ĉi-aspektan’ (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti ‘tiel ĉi’. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel ‘**difin/o**’. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Se sur via aparato ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj CSS-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: **Nook**, **Kobo**, **Kindle**, ktp. Do, substrektoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton **EPub 3**, kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de **JavaScript**. Sed **EPub 2**, per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iometa helpo por komencantoj. Se viaopinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Fine sciu, ke ajna leganto rajtas peti aldonon de plua difino en la vortaro. Kontaktu la eldonejon epoŝte or sugesti pri tio.

**Propraj Nomoj:** Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn ‘-an’ ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn.

**Angla Titolo:** La referenca originalo kiun ni tradukis devenas el volumo 6a el la 44-voluma eldono *Vance Integral Edition* (**ISBN 0-9712375-1-4**), kun la angla titolo *Golden Girl and Other Stories*.



507

## Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas

Segŭilo ne povis esti foririnta longan distancon; mankis loko kien li povus foriri. Iam Pejren serĉadis la lumturon kaj la izolatan duon-**hektaron** da roko, ne plu restis eblaj lokoj — nur la ĉielo kaj oceano.

Segŭilo estis nek inter la lumturo nek ekstere.

Pejren eliris en la nokton, rigardis supren, kontraŭ la kvin lunoj. Segŭilo videblis nenie sur la supro de la lumturo.

Segŭilo malaperis.

Pejren rigardis sendecide transen super la fluanta salakvo de la Maŭrilmo Mar. Se Segŭilo estus glitŝtumblinta sur la malseka ŝtono kaj tiel falis en la maron, estas certe, ke li kriegus... La kvin lunoj flagris, rebrilis laŭ la surfaco; eblas, ke Segŭilo eĉ nun flosus nevidite malproksima je cent metroj.

Pejren vokegis trans la malhela avo: “Segŭilo!”

Li turniĝis, suprenrigardis fojon plu al la fronto de la lumturo. Ĉirkaŭ la horizonto rondiris la du strioj de ruĝa kaj blanka lumoj, gvidantaj la **barĝojn** transirantajn de Suda Kontenento al Kosmourbo, avertante ilin for de Isla Roko.

Pejren paŝadis rapide al la lumturo; Segŭilo preterdube dormis en sia lito aŭ en la necesejo.

Pejren iris al la supra ĉambro, ĉirkaŭpromenis la lumaĵon, grimpis malsupren laŭ la ŝtuparo. “Segŭilo!”

Nenia respondo. La lumturo resendis metalan vibrantan eĥon.

Segŭilo ne estis en sia ĉambro, en la necesejo, en la manĝejo, aŭ en la stokejo. Kie krome povus viro iri?

Pejren rigardis el la **kluz**-pordo. La kvin luno ĵetis konfuzajn ombrojn. Li vidis grizan makulon — “Segŭilo!” Li kuris eksteren. “Kie vi estadis?”

Segŭilo rektiĝis al sia plena staturo, maldika viro kun saĝa malĝoja vizaĝo. Li turnis la kapon; la vento blovis liajn vortojn preter la okuloj de Pejren.

Subita enlumiĝo venis al Pejren. “Devas esti, ke vi estis sub la generatoro!” La sola loko kie li estis povinta esti.

Segŭilo venis pliproksimen. “Jes ... mi estis sub la generatoro.” Li paŭzis malcerte apud la pordo, staradis rigardanta supren al la lunoj, kiuj ĉi vespere leviĝis ĉiuj kune. Konfuziĝo sulkigis la fronton de Pejren. Kial Segŭilo rampus sub la generatoron? “Ĉu vi — estas bonsana?”

“Jes. Tute sana.”

Pejren paŝis pliproksimen kaj en la lumo de la kvin lunoj, Isto, Bisto, Liedo, Miedo kaj Pojdeo, studrigardis Segŭilon akre. Liaj okuloj estis malklaraj kaj sendecidemaj; li ŝajnis porti sin rigide. “Ĉu vi vundis vin? Venu ĉi tien al la ŝtupoj kaj sidiĝu .”

“Nu bone.” Segŭilo paŝadis lace trans la roko, sidiĝis sur la ŝtuparon.

“Ĉu vi certas, ke vi estas bone?”

“Mi certas.”

Post momento Pejren diris, “Tuj antaŭ ol vi — iris sub la generatoron, vi planis informi al mi pri io, kion vi diris estis grava.”

Segŭilo kapjesis malrapide. “Jes, prave.”

“Kio ĝi estis?”

Segŭilo fiksrigardis stulte supren en la ĉielon. Nenio aŭdeblis krom la ŝaŭmo de la maro, siblanta kaj alpuŝanta tie, kie la roko subiĝis kiel breto.

“Do?” demandis Pejren fine. Segŭilo hezitis.

“Vi diris, ke kiam kvin lunoj leviĝas kune en la ĉielo, estas malsaĝe kredi ion ajn.”

“Nu,” kapjesis Segŭilo, “tiel mi diris.”

“Kion vi volis diri?”

“Mi ne certas.”

“Kial gravas, ke oni kredu nenion ajn?”

“Mi nescias.”

Pejren leviĝis abrupte por stari. Segŭilo normale kondukis krispe, seke emfaze. “Ĉu vi certas, ke vi tute bonsentas?”

“Tiel deca kiel pluvo.”

Jen iom pli kiel Segŭilo. “Eble drinketo da viskio plibonigos vin.”

“Tio ŝajnas esti bona ideo.”

Pejren sciis tion, kie Segŭilo kaŝadis sian privantan stokon. “Vi sidu ĉi tie, mi portos al vi glaseton.”

“Ĵes, mi sidados ĉi tie.”

Pejren haste eniris la lumturon, rapidis supren laŭ la du ŝtuparoj al la manĝejo. Segŭilo eble restus sidanta aŭ eble ne; io pri lia pozo sugestis, ke li ne faros. Pejren trovis la botelon kaj glason, kuris ree malsupren laŭ la ŝtupoj. Iel li certis, ke Segŭilo estos foririnta.

Segŭilo etis for. Li ne estis sur la ŝtupoj, nenie sur la ventoblovita duonhektaro de Isla Roko. Estis maleble ke li pasis Pejrenon sur la ŝtuparo. Li eble ekiris en la motoran ĉambron kaj rampis sub la generatoron refoje.

Pejren tiregis malsupren la pordon, ŝaltis la lumilojn, kaŭris, strebe rigardis sub la ŝirmilo. Nenio.

Olea tavolo de polvo, unuforma, nemarkita, indikis ke neniam ajn estis iu ajn tie.

Kie Segŭilo?

Pejren supreniris al la plejsupra parto de la lumturo, zorge serĉis ĉiun loketon suben ĝis la dekstera enirejo. Segŭilo tute mankis.

Pejren paŝadis eksteren sur la roko. La loko estis nuda kaj malplena; Segŭilo mankis.

Segŭilo forestis. La malhela akvo de Maŭrilmo Mar suspiris kaj fluis trans la breto.

Pejren malfermis la buŝon por vokegi trans la lun-briligitaj ondegoj, sed li sentis, ke estis iel maldece vokegi. Li reiris al la lumturo, sidigis sin antaŭ la radio-interparolilo.

Sendecide li tuŝis la **rego-diskojn**; estis Segŭilo kiu respondecis pri la aparato antaŭe. Segŭilo mem ĝin konstruis, el partoj konservitaj el paro da malnovaj aparatoj.

Pejren heziteme movis ŝaltilon. La ekrano flagrade lumiĝis, la parolilo zumis kaj siblis. Pejren faris hastajn ŝanĝetojn. La ekrano surstiiĝis per saĝetoj el blua lumo, ŝpruco el rapidaj, ruĝaj makuloj. Malkalre, malfortlume, vizaĝo ekrigardis el la ekrano. Pejren rekonis malaltrangan **komizon** en la Komisia oficejo ĉe Kosmourbo. Li parolis hastege. “Mi estas Harold Pejren, ĉe Lumturo Isla Roko; Sendu helpistan ŝipon.”

La vizaĝo en la ekrano rigardis al li kvazaŭ tra dike nodosurfaca vitro. Malforta voĉo, superŝutita de **sput--**sonoj kaj **krakado**, diris, “Ĝustigu vian frekvencon ... mi ne povas aŭdi vin...”

Pejren plilaŭtigis sian voĉon. “Ĉu vi povas aŭdi min nun?”

La vizaĝo en la ekrano ondis kaj **fadis**.

Pejren kiriegis, “Tiu ĉi estas Lumoturo Isla Roko! Sendu helpoŝipon! Ĉu vi aŭdas? Okazis akcidento!”

“... signaloj ne riceviĝas. Plenumu raporto, sendu ...” la voĉo sputosone **fadis** for.



Blasfemante furioze sub la spirado, Pejren tordis la rego-diskojn, batetis la ŝaltilojn. Li batadis la aparaton per la pugno. La ekrano ekbrilis oranĝe, mortis.

Pejren kuris al ĝia malantaŭo, laboris kvin minutojn ekscite, je neniu rezulto. Nenia lumo, nenia sono.

Pejren malrapide stariĝis. Tra la fenestro li ekvidis la kvin lunoj konkursantaj okcidente. “Kiam la kvin lunoj leviĝas kune,” Segŭilo estis diranta, “ne estas saĝe, ke oni kreu ion ajn.” Segŭilo etis for. Li jam estis for unufoje kaj tamen revenis; eble li revenos fojon plu. Pejren grimacis, ekstremetis. Estus pli bone nun, se Segŭilo restus for. Li kuris suben al la ekstera kluz-pordo, fermegis kaj ŝlosis ĝin. Malbone por Segŭilo, se li vagus revene... Pejren restis momenton apoge kontraŭ la pordo, aŭskultanta. Post tio li iris al la generatora ĉambro, rigardis sub la generatoron. Nenio. Li fermis la pordon, supreniris la ŝtupojn.

Estis neniu en la manĝejo, la stokejo, la necesejo, la dormĉambroj. Neniu en la lumo-ĉambro. Neniu sur la tegmento.

Neniu en la lumturo krom Pejren.

Li reiris al la manĝejo, kuiris poton da kafo, sidis je duono da horo aŭskultanta la supspiradon de akvo trans la rokbreto, poste iris al sia lito.

Pasante la ĉambron de Segŭilo li enrigardis. La lito malplenis.

Kiam fine li vekigis en la mateno, la buŝo sekis, la muskoloj sentis tiel kiel aroj da fragmitoj, liaj okuloj sentis varmaj pro longe fiksrigardi supren al la plafono. Li verŝis la vizaĝon kun malplena akvo kaj, irante al la fenestro, serĉis la horizonton. Kurteno el malpuraspekta nubaroj pendis en la orienta mez-distanco; blu-verda Magdo brilis kiel antikva monero kovrita de **verdigo**. Ĉe la akvosupro oleaj ŝmiriĝoj de blu-verda lumo formiĝis kaj rompiĝis kaj fandiĝis ... Ĉe la suda horizonto Pejren vidis paron da nigraj bargoj rajdantaj la Komercan Kurenton al Kosmourbo. Post kelkaj minutoj ili malaperis en nebuleco.

Pejren ŝaltis la ĉef-ŝaltilon; super li aŭdiĝis la flagranta zumo de la lumfonto malrapidiĝanta kaj malbriliĝanta.

Li malsupreniris la ŝtuparon, per fingroj rigidaj malŝlosis la pordajn

fermegilon, malfermis ĝin tute. La vento blovis preter liajn orelojn, odoranta de la Maŭrilmo Mar. La **tajdo** estis malalta; Isla Roko staris el la akvo kiel **selo**. Li paŝadis zorge al la akvorando. Blu-verda Magdo montriĝis libera de la nubaro; la lumo penetris sub la akvon. Kliniĝante danĝere super la roka breto, Pejren rigardis suben, preter ombroj kaj bretaĵoj kaj kavaĵoj, suben en la malklarecon... Estis ia movo; Pejren strebe rigardis por vidi. La piedo glitis, preskaŭ li falis.



S. G. 15

Pejren reiris al la lumturo, laboris senespere tri horojn pri la radioaparato, fine decidis, ke iu nepra ero detruigis.

Li malfermis tagmezmanĝan ujon, tiris seĝon al la fenestro, sidadis elrigardanta trans la oceanon. Dek unu semajnoj ĝis venos la interŝanĝa ŝipo. Isla Roko estis jam iom izolo eĉ kun Segŭilo.

Blu-verda Magdo sinkis en la okcidento. Sulfur-kolora nubareco drivis supren por renkonti ĝin. Sunsubiro portis kelkajn minutojn de malĝoja gloro al la ĉielo: jad-kolora makulo kun violaj striiĝoj. Pejren ektimetis pro la du strioj de ruĝo kaj blanko trairantaj siajn noktajn rondirojn, iris por staradi ĉe la fenestro.

La tajdo estis leviĝanta, la akvo ondegis supre la breton kun peza sono. Supren de la okcidento flosis luno: Isto, Bisto, Liedo, Miedo aŭ Pojdeo? Indiĝenulo rekonus je ekvideto. Supren ili venis, unu post alia, kvin pilkoj tiom bluaj kiom malnova glacio.

“Ne estas saĝe, ke oni kredu...” Kion Segŭilo estis volanta diri? Pejren provis pensi pri la pasinteco. Segŭilo diris, “Ne estas ofte, tre rare, fakte, ke la kvin lunoj grupiĝas — sed tiam, kiam ili faras, okazas altaj tajdoj.” Kaj li hezitis, rigardante eksteren al la breto. “Kiam la kvin lunoj leviĝas kune,” diris Segŭilo, “ne estas saĝe, ke oni kredu pri io ajn.”

Pejren tiam rigardadis lin kun fronto sulkita en konfuziĝo. Segŭilo estis malnova spertulo, kiu konis la fablojn kaj popol-sciaron, kion li pridiris de tempo al tempo. Pejren neniam certis pri tio, kion li atendu de Segŭilo; li havis la trajton nemalhaveblan de lumtura profesiulo — malparolemo. La radio-aparato estis lia hobia; en la malkapablaj manoj de Pejren, la instrumento detruis sin. Tio, kion la lumturo bezonis, pensis Pejren, estis unu el la novaj radio-aparatoj kuj memhavas la povofonton, kaj majstran regilon, la novtipan organikan ekranon, molan kaj flekseblan, io tia kia grandega okulo... Subita pluvonubo ekkovris duonon de la ĉielo; la kvin lunoj konkursis al la nubaro. La tajdo ekpuŝis sin alten super la breto, preskaŭ super griza maso. Pejren okulumis ĝin kun intereso; kio ĝi povus esti? Io proksime tiom granda, kiom radia interparolilo, ĉirkaŭ la sama grandeco kaj formo. Komprenible, ĝi ne eble povus esti interparolilo; tamen, kiel bone mirinda afero se tiel estus... Li kunpremetis la palpebrojn, strebe rigardis. Jen, certe, estis la lakto-kolora ekranon; tiuj nigraj makuloj estis rego-diskoj. Li salte stariĝis, kuris

malsupren laŭ la ŝtupoj, el la pordo, trans la roko... Estis preter-racie; kial interparolilo ekaperu ĝuste tiam, kiam li ĝin deziras, kvazaŭ responde al preĝo? Komprenible, ĝi povus esti parto de ŝarĝaĵo perdita de ŝipo...

Kaj ja, la meĥanismo estis ŝraŭbe ligita al flosaĵo el Manésk-arbaj ŝtupoj, kaj evidente dravis supre sur la breto kiam la tajdo altis.

Pejren, malkapabla kredi sian bonfortunon, kaŭris apud la griza skatolo. Tute nova, kun ruĝa glumarko super la ĉefa ŝaltilo.

Ĝi estis tro peza por portiĝi. Pejren detiris la glumarkon, ŝaltis la energion: jen estis tia aparato kia li povis kompreni. La ekrano lumis brile.

Pejren ĝustigis rego-diskon al la Registara frekvenco. La interno de oficejo aperis kaj frotante elen estis, ne la trodetalema subulo, sed Oficestro Rejmond Flint mem. Neniel povus esti pli bone.

“Oficestro,” elvokis Pejren, “jen Lumturo Isla Roko, Harold Pejren parolanta.”

“Ho, jes,” diris Oficestro Flint. “Kiel vi estas, Pejren? Kio estas la problemoj?”

“Mia kunlaboranto, Andij Segŭilo, malaperis — ekforestis al neniejo; mi estas sola ĉi tie.”

Oficestro Flint aspektis ŝokite. “Malaperis, ĉu? Kio okazis? Ĉu li falis en la oceanon?”

“Mi ne scias. Li nur malaperis. Tio okazis hieraŭ vespere —”

“Decus, se vi estus vokinta nin pli frue,” diris Flint malaprobe. “Mi estus sendinta helpan helikopteron por serĉi lin.”

“Mi provis voki,” Pejren eksplikis, “sed mi ne povis funkciigi la kutiman interparolilon. Ĝi interne elbruliĝis ... mi pensis min, forlasita ĉi tie.”

Oficestro Flint levis la brovojn en milda kurioziĝo. “Ĝuste kion vi uzas nun?”

Pejren stumble parolis, “Ĝi estas tute nova instrumento ... simple floris supren el la maro. Probable ĝi perdiĝis de bargo.”

Flint kapjesis. “Tiuj barĝistoj estas senzorga grupo — ŝajne ne komprenas la koston de bona ekipaĵo... Nu, sintenu vin sekure. Mi ordonos, ke aviadilo alflugu tien je la mateno kun interŝanĝa deĵoristaro. Vi ordoniĝos al deĵoro ie ĉe la Flora Marborod. Kiel vi ŝatos tion?”

“Tre bone, moŝto,” diris Pejren. “Ja tre bone. Mi ne povas elpensi ion ajn, kion mi ŝatus pli multe ... Isla Roko jam komencas agaci la nervojn.”

“Kiam la kvin lunoj leviĝas, ne estas saĝe, ke oni kredu ion ajn,” diris Oficestro Flint en voĉo funebra.

La ekrana bildo malpleniĝis.

Pejren levis la manon, malŝaltis la energion. Guto de pluvo surfalis lian vizaĝon. Li ekrigardis ĉielen. La ŝtorma nubetaro preskaŭ alvenis super li. Li tiradis al la interparolilo, malgraŭ tio, ke li bone komprenis, ke ĝi tro pezis por esti movebla. En la stokejo estis ŝirm-blankedo kio gardos la interparolilon ĝis la mateno. La interŝanĝa teamo povos helpi lin porti ĝin internen..

Li kuris reire al la lumturo, trovis la ŝirm-blanketon, hastis ree eksteren. Kie la interparolilo? ... Ho — jen. Li kuris tra la frapadantaj gutoj, volvis la ŝirm-blanketon volve ĉirkaŭ la skatolo, ŝnure fiksas ĝin sekure, kuris reire al la lumturo. Li ŝlosis la kluz-pordon, kaj fajfante, malfermis ladon de vespermanĝa pakaĵo.

La pluvo giris kaj falis preskaŭ tranĉe kontraŭ la lumturo. La du striegoj de blanko kaj lumo svingiĝis sovaĝe ĉirkaŭ la ĉielo. Pejren engrimpis sian liton, kuŝadis varme kaj dormeme... La malapero de Segŭilo estis terura okazo; ĝi lasos cikatron sur la menso. Sed ĝi estas jam okazinta kaj finita. Li puŝu la afereron malantaŭ si; rigardu al la futuro. La Flora Marbordo...

Je la mateno la ĉielo estis nuda kaj pura. Maŭrilmo Mar etendiĝis spegule kvieta ĝis la limo de vidkapablo. Isla Roko kuŝis nuda en la sunlumo. Rigardante el la fenestron, Pejren vidis malordan amason — la ŝirm-blankedo, la ŝnuroj. La interparolilo, la Manésk-arba filoso jam tute malaperis.

Pejren sidis en la pordejo. La suno suprengrimpis la ĉielon. Dek du fojojn li eksaltis stariĝe, aŭskultante por la sono de motoroj. Sed neniu interŝanĝa aviadilo aperis.

La suno atingis la **zeniton**, progresis okcidenten. Barĝo drivis pasante je distanco du-kilometra. Pejren ekkuris elen sur la rok-breto, krieganta, svingante la brakojn.

La lace ripozantaj, ruĝaj barĝistoj kuŝantaj sur la ŝarĝaĵoj rigardis kurioze, faris nenan movon. La barĝo malproksimiĝadis for al la oriento.

Pejren revenis al la pordejo, sidiĝis kun la kapo en manoj. Febro kaj sentoj de korpa ekfridiĝo laŭiris lian haŭton. Neniu interŝanĝa aviadilo venos. Sur Isla Roko li restados, tagon post tago, dum dek unu semajnoj.

**Apatie** li supreniris la ŝtupojn al la manĝejo. Estis nenia manko de manĝaĵoj, li neniam malsatos. Sed ĉu li povos elteni la solecon, la necertecon? Segŭilo iranta, venanta, iranta... La sensubstanca interparolilo... Kiu respondecas pri tiuj ĉi kruelaj ŝercoj? La kvin lunoj leviĝantaj kune — ĉu ie estis ia interligeco?

Li trovis **almanakon**, portis ĝin al tablon. Ĉe la supro de ĉiu paĝo kvin blankaj cirkloj sur nigra strio reprezentis la lunojn. Antaŭ semajno li distribuiĝis hazarde. Kvar tagojn antaŭe Liedo, la plej malrapida, kaj Pojdeo, la plej rapida, situis tridek gradojn apartaj, kun Isto, Bisto kaj Miedo inter ili. Du noktojn antaŭe la randoj preskaŭ tuŝis; hieraŭ-nokte ili eĉ pli interproksimiĝis. Ĉi-nokte Pojdeo puŝus sin iomete preter Isto, morgaŭ-nokte Liedo malantaŭos post Bisto... Sed inter la kvin lunoj kaj la malapero de Segŭilo — kie troviĝas la interligo?

Malĝoje, Pejren manĝis sian vespermanĝaĵon. Magdo malsupreniris en Maŭrilmo Mar sen montri kolorojn, malinteresa krepusko falis super Isla Roko, akvo leviĝis kaj suspiris trans la rok-breto.

Pejren ŝaltis la lumegon, ŝlisis la pordon. Okazos ne plu da esperado, ne plu da sopirado — ne plu da kredado. Post dek unu semajnoj la interŝanĝa ŝipo venos por reporti lin al Kosmourbo; dum la intertempo li devos fari tiom bone kiom li povus en la situacio.

Tra la fenestro li vidis bluan lumeton en la oriento, rigardis Pojdeon, Iston, Biston, Liedon kaj Miedon suprenirantajn en la ĉielo. La tajdo venis kun la lunoj. Maŭrilmo Mar ankoraŭ kalmis, ĉiu luno kuŝiĝis apartan voj-strian reflektajaĵon sur la akvan surfacon.

Pejren rigardis supren en la ĉielon, ĉirkaŭen laŭ la horizonto. Bela, soleca vidaĵo. Kun Segŭilo li foje sentis sin sola, sed neniam tian solececon kian tiu ĉi. Dek unu semajnoj da izoleco... Se eblus, ke li povus elekti kunulon... Pejren permesis, ke la menso vagadas.

En la lunlumo svelta figuro venis paŝanta, portanta brunetan pantalonon kaj mallong-manikan blankan bluzon.

Pejren rigardadis fikse, sen kapablo movi. La figuro marŝis al la kluz-pordo, frapetis. La dampita sono venis supren laŭ la ŝtuparo. “Saluton, ĉu oni estas hejme?” Estis klara virina voĉo.

Pejren svingis malferme la fenestron, elvokis raŭke, “Iru for!”

Ŝi paŝis retroen, turnis supren la vizaĝon, kaj la lunlumo surfalis ŝiajn aspekterojn. La voĉo de Pejren mortis en lia gorĝo. Li sentis, ke la koro batadis sovaĝe.

“Iru for?” ŝi diris en mola konfuzita voĉo. “Mi havas neniun lokon por ke mi foriru.”

“Kiu vi estas?” li demandis. Lia voĉo sonis strange al la propraj oreloj — urĝe bezona, esperega. Preter ĉio, ŝi estis ebla — kvankam preskaŭ neeble bela... Povas esti, ke ŝi alvenis fluge de Kosmourbo. “Kiel vi venis ĉi tien?”

Ŝi gestis elen al Maŭrilmo Mar. “Mia aviadilo kraŝetis ĉirkaŭ kvin kilometroj for. Mi alvenis sur la pneŭmatika savboateto.”

Pejren rigardis serĉe laŭ la akvorando. La silueta formo de savboateto iomete videblis.

La knabino vokis supren, “Ĉu vi permesos, ke mi eniros?”

Pejren stumble subeniris la ŝtuparojn. Li haltis ĉe la pordo, unu mano sur la fermiloj, kaj sangfluo aŭdeblis en liaj oreloj.

Malpacienca frapetado ŝoketis al li la manon. “Mi fridiĝas preskaŭ ĝismorte ĉe la ekstero ĉi tie.”



Pejren lasis, ke la kluzpordo svingiĝis malferme. Ŝi staris frotante lin, duonridete. “Vi estas tre singarda lumturisto — aŭ elbe virin-malamanto?”

Pejren studis ŝian vizaĝon, ŝiajn okulojn, la esprimon de ŝia buŝo. “Ĉu vi estas ... reala?”

Ŝi ridis, neniel ofendita. “Certe mi estas reala.” Ŝi eltenis manon. “Tuŝu min.” Pejren fiksrigardis al ŝi — la esenco de nokto-floroj, mola silko, varma sango, dolĉeco, feliĉiga fajro. “Tuŝu min,” ŝi rediris milde.

Pejren ekmoviĝis retroen sencerta, kaj ŝi venis antaŭen, en la lumturon. “Ĉu vi povas alvoki la ĉeflandon?”

“Ne ... mia interparolilo ne funkcias.”

Ŝi turnis al li ekan **lampirecan** rigardon. “Kiam venos la venonta interŝanĝa boato?”

“Post dek unu semajnoj.”

“Dek unu semajnoj!” ŝi suspiris molan, malprofundan suspiron.

Pejren moviĝis retroen je plua duon-paŝo. “Kiel vi sciis, ke mi estas sola?”

Ŝi ŝajnis konfuzite. “Mi ne sciis... Ĉu lumturaj deĵoristoj ne ĉiam solas?”

“Ne.”

Ŝi venis unu paŝon pliproksimen. “Vi ne ŝajnas plaĉigita pri renkontiĝo a l mi. Ĉu vi estas ... **ermito**?”

“Ne,” diris Pejren en raŭketa voĉo. “Tute renverse... Sed mi apenaŭ kapablas akcepti vin. Vi estas miraklaĵo. Io tro bona por esti vera. Ĝuste nun mi esperis por iu ... iu precize kia vi. Precize.”

“Kaj jen mi estas.”

Pejren moviĝis malkomforte. “Kio estas via nomo?”

Li sciis tion, kion ŝi diros, antaŭ ŝi diris. “Su.”

“Su kiu?” Li provis teni la menson malplena.

“Ho ... simple Su. Ĉu tio ne sufiĉas?”

Pejren sentis, ke la vizaĝa haŭto striktiĝas. “Kie via hejmo?”

Ŝi rigardis senindike super la ŝultro. Pejren tenis la menson malplena, sed la vorto elvenis mem.

“Infero.”

La spirado de Pejren fariĝis malmola kaj akra.

“Nu, kiel estas Infero?”

“Ĝi estas ... malvarma kaj malluma.”

Pejren paŝis retroen. “Iru for. Iru for.” Lia vidkampo malklariĝis; ŝia vizaĝo fandiĝis kvazaŭ larmoj iel venis al la okuloj.

“Kien mi iru?”

“Ree tien, de kie vi venis.”

“Sed —” kompatinde sola “— estas nenia loko krom Maŭrilmo Mar. Kaj supre ĉi tie —” Ŝi ekhaltis, faris unu rapidan paŝon antaŭen, staris suprenrigardante al lia vizaĝo. Li povis senti la varmecon de ŝia korpo. “Ĉu vi timas min?”

Pejren tiris la okulojn for de ŝia vizaĝo. “Vi ne reale ekzistas. Vi estas io kio prenas la formon de miaj pensoj. Eble vi mortigis Segŭilon... Mi ne scias tion, kio vi estas. Sed vi ne estas reala.”

“Ne reala? Kompreneble, mi estas reala. Tuŝu min. Sentu mian brakon.” Pejren retroiris. Ŝi diris pasie, “Jen estas tranĉilo. Se vi tiel inklinas, tranĉu min; vi vidos sangon. Tranĉu pli profunden ... vi trovos oston.”

“Kio okazus,” diris Pejren, “se mi ekpuŝus la tranĉilon en vian koron?”

Ŝi diris nenion, fikse rigardanta lin per grandaj okuloj.

“Kial vi venas ĉi tien?” kriis Pejren. Ŝi turnis la rigardon for, reen al la akvo.

“Estas magio ... mallumo ...” La vortoj estis murmura konfuzaĵo; Pejren subite atentis, ke la samaj vortoj venis el la propra menso. Ĉu ŝi nur papage rediris liajn pensojn dum la tuta konversacio? “Poste venas la malrapida tirado,” ŝi diris. “Mi drivas, mi frandas la aeron, la lunoj tiras min supren ... mi faras ion ajn por kroĉi al loko propra en la aero...”

“Parolu viajn proprajn vortojn,” diris Pejren acide. “Mi scias, ke vi ne estas reala — sed kie Segŭilo?”

“Segŭilo?” Ŝi etendis manon malantaŭ la kapon, tuŝis al si la harojn, ridetis dormeme al Pejren. Realaj aŭ ne, la sango-pulso tondris en liaj oreloj. Ĉu reala aŭ ne...

“Mi ne estas sonĝo,” ŝi diris. “Mi realas...” Ŝi proksimiĝis malrapide al Pejren, sentanta liajn pensojn, la vizaĝo suspekteme demanda, preta.

Pejren diris raspe anhele, “Ne, ne. Iru for. *Iru for!*”

Ŝi ekhaltis, rigardis al li tra okuloj subite senesprimaj. “Nu, laŭ via volo. Mi iros nun —”

“Nun! Por ĉiam!”

“ — sed eblas, ke vi min revokos...”



5067-15

Ŝi paŝadis malrapide tra la pordo. Pejren kuris al fenestro, rigardis la sveltan formon malklariĝi en la lunlumo. Ŝi iris al la rando de la rokbreto; ĉi tie ŝi paŭzis. Pejren sentis subite netolereblan emocion doloran; kion li forĵetas? Reala aŭ ne, ŝi estis tio, kion li deziris ŝin esti; ŝi estis egala al realeco... Li kliniĝis antaŭen por voki, “Revenu ... kio ajn vi estas...” Li detenis sin. Kiam li rigardis fojon plu, ŝi tiam estis malaperinta... Kial ŝi malaperis? Pejren pripensadis, rigardanta trans la lunlumigita maro. Li estis dezirinta ŝin, sed li ne plu kredis je ŝi. Li estis kredinta pri la formo nomata Segŭilo; li estis kredinta pri la interparolilo — kaj ambaŭ sklave obeis liajn instruojn. Same faris la knabinon, kaj li sendis ŝin for... Ĝuste faris, ankaŭ, li diris al si domaĝe. Kiu scias tion, kio ŝi estus fariĝinta tiam, kiam lia dorso estus turniĝata...

Kiam sunleviĝo fine venis, ĝi portis novan kurtenon el nubareco. Blu-verda Magdo briletadis senforte kaj sufoke varmeta kiel ŝima oranĝo. La akvo tiel briletis, kiel oleo... Estis moviĝo en la okcidento — privata barĝo de Páinapa tribestro, paŝanta trans la horizonto kiel akvo-araneo. Pejren supersaltis la ŝtupojn kondukantajn al la lum-ĉambro, turnis la lumilon tiel, ke ĝi brilu fokuse sur la barĝon, sendis frenezetan serion da ekbriloj.

La barĝo moviĝadis plu, la artikaj remiloj svingiĝantaj ritme en kaj el la akvo. Nebulo en formo de ŝirita sako drivis trans la akvo. La barĝo fariĝis malhela, ekmoviĝanta formo, malaperis.

Pejren iris al la malnova interparolilo de Segŭilo, sidis rigardanta ĝin. Li salte stariĝis, tiris la bazon el la skatolon, apartigis la tutan cirkvicon.

Li vidis bruligitan metalon, dratojn fanditajn en gutaĵojn, fenditan **ceramikon**. Li puŝis la interplektaĵon en angulon, iris por stari apud la fenestro.

La suno estis ĉe la zenito, la ĉielo estis el la koloro de verdaj vinberoj. La maro ŝvel-ondadis malrapide, je grandaj senformaj ŝvelaĵoj leviĝantaj kaj falantaj sen evidenta direkto. Nun la tajdo estis malalta; la rok-breto montris sin alte, la nigra roko montranta sin nuda kaj stranga. La maro palpetis, supren, suben, supren, suben, suĉante brue al pecetoj de mar-flosaĵo.

Pejren malsupreniris la ŝtupojn. Laŭire suben li rigardis al la neceseja spegulo, kaj la propra vizaĝo spegule rigardis fikse al li, pala, okulaj larĝe apartaj, vangoj

kavaj kaj senkoloraj. Peren daŭrigis sian subeniradon laŭ la ŝtupoj, paŝis elen en la sunlumon.

Zorge li paŝadis elen sur la rok-breton, rigardis en ia fascineco suben preter la rando. La suprenpuŝo de la ŝvel-ondoj malformigis al li la vidaĵojn; li povis vidi malmulte pli krom ombroj kaj ŝanĝiĝantaj fingroj da lumo.

Paŝon post paŝo li vagadis laŭ la rok-breto. La suno kliniĝis okcidenten. Pejren retretis supren laŭ la roksurfaco.

Ĉe la lumturo li sidigis sin en la pordejo. Ĉinokte la pordo restos sekurigita. Neniu instigo povus persvadi lin pri ĝia malfermo; la plej ensorĉaj vidaĵoj petegos al li senrezulte. Liaj pensoj turniĝis al Segŭilo. Kion kredis Segŭilo; kiu estulo fabrikita el lia malĝojema fantasto kun la povo kaj malico por treni lin for? ... Ŝajnis, ke ĉiu viro estas viktimo de siaj propraj imagaĵoj. Isla Roko ne tiam estas bona loko por imagema viro kiam la kvin lunoj leviĝas kune.

Ĉinokte li sekurigis la kluz-pordon, li enlitigis sin kaj dormos, sekura pro la baroj de la **veldita** metalo kaj la propra senkonscienco.

La suno sinkis en nebularo el peza vaporo. La nordo, oriento, sudo briletiĝis per violo; la okcidento briletis limone verda, malbriliĝante rapide tra koloroj brunaj. Pejren eniris la lumturon, fiksas fermita la pordon, funkciigis la du striojn da ruĝa kaj blanka lumoj, ke ili rondiradu la horizonton.

Li malfermis vespermanĝ-pakaĵon, manĝis senentuziasme. Ekstere estis malhela nokto, malplena ĝis ĉiuj horizontoj. Dum la tajdo leviĝadis, la akvo siblis kaj muĝetis transirante la rok-breton.

Pejren kuŝadis en sia lito, sed dormo retis tre for de li. Tra la fenestro venis elektra brileco, poste leviĝis la kvin lunoj, brilante tra alta nubaro kvazaŭ volvitaj en blua **gazo**.

Pejren moviĝegadis senripoze. Estis nenio timinda, li estis sekura en la lumturo. Neniu homaj manoj povus perforti la pordon; por tio necesus la forto de pra-elefanto, la ungegoj de roka ĉaŭndrilo, la feroco de Málđina ter-ŝarko...

Li levis sin por ripozi apoge sur kubuton en la lito... Ĉu estis sono de ekstere?

Li strebe trarigardis la fenestron, la koro en la buŝo. Alta formo, malklara. Dum li rigardadis, ĝi kurbe marŝis al la lumturo — kiel li certis, ke ĝi estis faronta.

“Ne, ne,” kriis Pejren kviete. Li ĵetis sin en la liton, kovris la kapon sub du blankedojn. “Ĝi estas nur tio, kion mi mem elpensas, ĝi ne estas reala... Iru for,” li flustris feroce. “Iru for.” Li aŭskultis. Devas esti, ke ĝi nun proksimas al la pordo. Ĝi estus levanta pezan brakon, la ungoj estus reflektantaj brilerojn en la lunlumo.

“Ne, ne,” kriis Pejren. “Nenio estas tie...” Li pozis la kapon alte por aŭskultegi.

Skusono, raspono ĉe la pordo. Bategsono tiam, kiam granda masivaĵo provis la seruron.

“Iru for!” kriegis Pejren. “Vi ne estas reala!”

La pordo muĝis, la sekuriloj fleksiĝis.

Pejren staris ĉe la supro de la ŝtuparo, spiregante peze tra la buŝo. La pordo estos enpuŝegota post plua momento. Li certis pri tio, kion li estos vidanta: nigra formo alta kaj ronda kiel fosto, kun okuloj tiaj kiaj lampoj de kaleŝo. Pejren eĉ certis pri la lasta sono kion siaj oreloj estos aŭdantaj — terura grinca malmuzika sonaĉo...

La supra sekurilo ekrompiĝis, la pordo enfleksiĝis. Grandega nigra brako puŝiĝis internen. Pejren vidis la ungegojn montri rebrilojn dum la fingroj etendiĝis serĉe por la malfermilo.

Liaj okuloj ekserĉadis la lumturon por trovi armilon... Estis nur ŝraŭb-ŝlosilo, manĝilara tranĉilo.

La suba sekurilo disrompiĝis, la pordo tordiĝis. Pejren staradis fiksrigardante, la menso malfandiĝinta. Unu penso leviĝis de iu kaŝita viv-tena centro. Ĉi tie, Pejren pensis, estis la sola ŝanco.

Li kuris reire en sian ĉambron. Malantaŭ li la pordo kraŝis, li aŭdis pezajn paŝojn. Li ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Jen lia ŝuo..

Frap! Supren laŭ la ŝtupoj, kaj la lumturo vibradis. La imago de Pejren

esploris la hororon, li certis pri tio, kion li estos aŭdanta. Do, sekve venis voĉo — raŭka, malplena, sed kiel alia voĉo kiu iam estis dolĉa. “Mi diris al vi, ke mi revenos.”

Frap — frap — supren laŭ la ŝtupoj. Pejren prenis la ŝuon je ĝia pinto, svingis, alfrapis la flankon de sia kapo.



Pejren regainis konsciecon. Li stumblis al la muro, apogis sin. Post iame li palpe trovis la vojon al sia lito, sidiĝis.

Ekstere estis ankoraŭ malluma nokto. Blekante, li rigardis el la fenestro en la ĉielon. La kvin lunoj pendis for, subaj en la okcidento. Jam Podeo vagadis antaŭen, dum Liedo sekvis malantaŭe.

Morgaŭan vesperon la kvin lunoj leviĝos ne kune.

Morgaŭan nokton ne estos altaj tajdoj, suĉantaj kaj termema laŭ la rok-breto.

Morgaŭan nokton la lunoj elvokos neniujn dezirantajn formojn el la fluanta mallumeco.

Dek unu semajnoj ĝis venos la interŝanĝa ŝipo. Pejren zorge palpetis la flankon de sia kapo... Ja konsiderinda kontuzo.





**almanak/o** Libreto, entenanta kalendaron, astronomiajn sciigojn por la kuranta jaro, veter-antaŭdirojn kaj aliajn diversajn informojn, ofte kun distra parto.

**apati/o** Stato de spirito, kiun nenio tuŝas, ekscitas aŭ suferigas,

**ar/o** Mezurunuoj de tersurfaco, valora je 100 m<sup>2</sup>; simbolo: a. **hektaro** Mezuro granda je cent aroj; simbolo: ha.

**barĝ/o** ⚓ Platkarena, malalta, kargoporta barko aŭ ŝipo, uzata ordinaro en riveroj, havenoj kaj kanaloj. ~EB 211/25, 220/20,22 ; ~BeE 375/87

**ceramik/o** Tekniko baki argilteron aŭ similan materialon kaj elfari tiel potojn, vazojn, kahelojn, elektronikajn komponantojn ktp.

**ermit/o** 1 Piulo vivanta en soleco. 2 (f) Homo, kiu sisteme evitas la aliajn, kaj izole vivas.

**damp/i** (tr) Malpliigi sonon aŭ bruon, inter aliaj.

**fad/i** ⚡ Fenomeno, konsistanta el sinsekvaj plimalfortiĝoj aŭ plifortiĝoj de aŭdebleco en radioriceviloj.

**gaz/o** Teksaĵo, malpeza kaj travidebla, el silko, lino.

**jad/o** Mineralo. Densa, polurebla variaĵo de amfibolo aŭ pirokseno, kun koloro varianta de la hela grizverdo ĝis la blanko, uzata en Oriento por etaj art-objektoj.

**kluz/o** 1 Mallarĝa parto de kanalo aŭ rivero, kies ekstremoj estas provizitaj per pordoj, kaj kiun oni uzas, por levi aŭ mallevi ŝipon, barĝon kc inter du kanal- aŭ river-partoj, en kiuj la akvonivelo ne estas la sama. ~EB 212/18; ~BeE 371/20  
2 Samfunkcia pordo inter lokoj de tre malsamaj medioj aŭ premofortoj: akvo/aero, aero/vakuo, kaj simile. Tia pordo, kun fermegiloj, sur ŝipo, kosmostacio, kaj tiel plu.

**komiz/o** Helpa salajrulo, kiu prizorgas la vendadon en komercfirmao, al la kontoraferojn en banko, ktp.

**krak/i** (ntr) Eligi sekan bruon, kiel de rompadon aŭ krevado.

**lampir/o** Genro de insektoj el la ordo de koleopteroj, havantaj lumantajn organojn sur la abdomeno. *Tie ĉi*: signifas pri momenta lumeco de ŝia esprimo.

**rego-disk/o** Diskforma plato, ofte kun eta elstara anso en meze, kaj gravurita ĉirkaŭ ĝia rando per aŭ ciferoj aŭ streketoj, kaj turnata fingre por regi aparaton.

**sel/o** **1** Remburita sidilo, kiun oni ligas sur la dorso de rajdobesto, por pli komforte sidi. → arko, pomelo, sako, zono. **2** Analoga sidrimedo, sur biciklo, motorciklo, aŭ kelkaj agrikulturaj maŝinoj. **3** Io en formo de selo, i.a.: Iom pli malalta tereno inter du montopintoj. Tiu parto de ŝafo, cervo kaj simile, kiu etendiĝas inter la ripoj kaj la femuroj. ~EB 72/37-49; ~BeE 141/20, 85/19

**sput/i** (tr) Amase aŭ daŭre elĵeti tra la buŝo (salivon, mukaĵon, sangon kaj simile) per ia senvola ago.

**sulfur/o** **1** ☞ Elemento, S, atomnumero 16, atommaso 32,07. **2** ☞ Nemetalo solida, helflava, senodora (en pura stato, sed forte ordora kiel sulfido), facile fandebla kaj brulema, kiun oni trovas en la vulkanaj elsputaĵoj aŭ ekstraktas el ercoj aŭ naturgasoj.

**svelt/a** Harmonie aŭ elegante maldika.

**ŝim/o** Mikroskopa fungo aŭ oomikoto, havanta bone rimarkeblan micelion aŭ sporaron.

**ŝtip/o** Mallonga, dika k peza peco de ligno, servanta por diversaj uzoj.

**tajd/o** Alterna kaj perioda movo de la mara akvo.

**veld/i** (tr) Kunfiksi du metalajn pecojn, ardigante ilin tiel, ke la junto fariĝas flueca, kaj poste kunforĝante ilin kiel unun, aŭ samtempe almetante fanditan metalon en la junton. ~EB 135/128

**verdigr/o** ☞ Kupra oksido.

**zenit/o** **1** La punkto sur la ĉiela sfero, situanta vertikale super la kapo de observanto. ☞ nadiro. **2** (f) Plej alta grado.

# Atribuoj

La subaj homoj kontribuis al tiu ĉi traduko, ĉiuj en diversaj tempoj kaj lokoj. Kie mankas indiko pri lando, tio okazis en Usono.

**Verkis:**

Jack Vance (1916-2013)  
Anglalingva titolo: *When the Five Moons Rise*

**Permesis:**

Jack & Norma Vance (*inter 1997 & 2013*)  
John Vance & **Spatterlight Press** (*post 2013*)

**Tradukis:**

Ĝan Ŭesli Starling  
Orlando Hernández, *Hispanio*

**Ilustris:**

Guillaume G nelot *Francio*

**Kontrolis:**

*Pluaj kontrolistoj invitiĝas — Ĉu eble vi?*

Se vi volas kontribui per pluse kontroli, kontaktu min epo te laŭ la jena adreso: [gan@starling.us](mailto:gan@starling.us)

# Senpage Haveblaj

<http://esperanto.us>



## Fantasto — *La Mortanta Tero*

### **Mazirien la Magiisto**

Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio superas ol scienco post ol la luno delonge malaperis kaj eĉ la suno mem ŝvelas ruĝe montante makulajn signojn de baldaŭa mallumiĝo.

### **Kugel La Ruza**

Sep sin-sekvaj noveloj formantaj la duan volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. Rakontaro en kiu humore krulea magiisto devigas friponan anti-heroon al grandega aventuro ĉe la fora flanko de l' mondo por plenumi nefareblan mision La aventuroj de Kugel la Ruza iom ŝokas kaj tre amuzas, ambaŭ samtempe.

## Scienca Fikcio — *Diversaj*

### **Trigamba Joĉjo**

Sur planedeto senaera du junuloj alfrontas beston nevenkeblan.

### **La Luna Sfingo**

En kulturo kie ĉiuj portas maskojn, ĵus alveninta diplomato ĉasas murdiston.

### **Domo de l' Se**

Post respondi al reklmao pri aventuro, viro ekfrontas multon pli ol atendite.

### **Retretejo Ulvarda**

Kiam surtere estas 50 miliardoj da homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol ĉio?

### **Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas**

Sur planedo havanta kvin lunojn, oni povas fidi pri nenio ajn tiam, kiam la kvin leviĝas samnokte.



Tiu ĉi Esperanta traduko pri *Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas* verkita de Jack Vance estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda

La permesilo temas sole pri tiu ĉi Esperanta traduko. La permesilo temas neniel kaj neniom pri la originalo kies ĉiuj rajtoj daŭre apartenas al John Vance kaj Spatterlight Press.